NUMERO 5

ESPÉRANTO NORD
www.esperanto-nord.org

07 FEB 2017

# NORDA ✯ KURIERO

## En Stella rendevuis festo kaj bona etoso!




Fotis Liba Gabalda

La 19$^{an}$ kaj 20$^{an}$ de novembro 2016 okazis la 28$^{a}$ Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage ĉe Maniko. Tiu renkontiĝo estas la plej granda en norda Francio.

Post Arlette kaj Edmond Plutniak venis nova organiza skipo estrata de Roch Jullien, konservante la tradician programon. La partoprenantoj elektis inter kvar atelieroj: “Eklerni kaj instrui la lingvon” kun Katalin Kováts, “Esperantaj bildrakontoj” kun Michel Dechy, “Esperanta literaturo” kun Anne Jausions kaj “Inico al jogo” kun Arlette Plutniak. Eblis ankaŭ elekti neniun atelieron por promeni kaj distriĝi.



Fotis Liba Gabalda

Kiel kutime estis libroservo proponita de belgaj amikoj kaj ekspozicioj de artaĵoj faritaj de partoprenantoj. Sabate vespere ni povis aplaŭdi la internacie faman kantiston JoMo. Li prezentis siajn tutnovajn kanzonojn; ĉi-foje sen sia gitaro, sed kun efektaparato, kiu ripetas sonojn kaj ritmojn.

La Rendevuanoj festis la 15-jariĝon de la retejo Edukado.net per bela kaj bongusta kukego: ĝoje blovestingis la kandelojn la retejestrino Katalin Kováts.

La venonta Rendevuo daŭros pli longe, de la 17$^{a}$ ĝis la 19$^{a}$ de novembro 2017, kun nova programo kaj kun la kutima bona etoso – kara al esperantistoj.




Fotis Liba Gabalda

# Lillo festis okaze de la Zamenhof-tago

Sabaton la 10an de decembro 2016 la Lilla Esperanto-klubo invitis al la Zamenhof-festo apud la Lilla urbocentro. Partoprenis pluraj esperantistoj kaj neesperantistoj por interŝanĝi, trinki kaj manĝi memfaritajn kukojn. Xavier Dewidehem memorigis la ĉefajn agojn de la klubo. Katja Boen raportis per videoj pri la Universala Kongreso, kiu disvolviĝis somere en Nitro (Slovakio). Michel Dechy kantigis ĉiujn en Esperanto. Dum tiu renkontiĝo fluis muziko, frando kaj rido!


Fotis Dorine Francheteau

# Jarkunvenis la Lilla klubo



Merkredon la 25an de januaro 2017 jarkunvenis la Lilla Esperanto-klubo. Estis reelektita la kluba estraro, inkluzive de Xavier Dewidehem kiel prezidanto. La klubo diskutis pri la ĉi-jaraj planoj: akcepto de eksterlandanoj, organizo de malfermaj prelegoj, aĉeto de plastaj Esperanto-glasoj (faritaj kaj venditaj de la Unuiĝo Franca por Esperanto), esperantigo de la porinfana bildrakonto "La Eta Muso", ktp.

# Gustumu la Orientfrisajn insulojn!

La germano Helmut Klünder prelegos **vendredon la 28an de aprilo 2017** je la 18:30 en la domo de Katja Boen en Lambersart ĉe Lillo: "La vivo sur la Orientfrisaj insuloj", kiuj troviĝas marborde de Germanio.

Lia prelego estos soci-geografia multmedia prezento por okuloj, nazo, lango, stomako kaj hepato. Vi malkovros la fenomenon de migrantaj insuloj, la funkciadon de la tajdo, la specifajn vivkondiĉojn sur tiuj insuloj, kaj diversajn fotojn. Helmut Klünder indikas: *"Ĉar mian prelegon oni ne povas sobre toleri, region-specifaj trinkaĵoj dum la prelego estos servataj!"* La daŭro de la prelego estas nedefinita: ĉi tiu finiĝos, kiam ĉiuj boteloj estos malplenaj!


Helmut Klünder

# Kial prezidento Donald Trump?





Duncan Charters

La Lilla klubo organizos malferman prelegon en **sabato la $11^{a}$ de marto 2017** je la 17:00 en MRES (23 rue Gosselet) en Lillo: “Kial prezidento Donald Trump?” far la brito Duncan Charters.

De lia perspektivo kiel brito loĝanta duonjarcenton en Usono, okazis profundaj sociaj ŝanĝoj en la lando. En la kuniĝo de reagoj al tiuj ŝanĝoj povas troviĝi ŝlosiloj por klarigi la neaŭtaŭvideblan kaj surprizan elekton de netradicia gvidanto por la venontaj kvar jaroj.

Profesoro doktoro Duncan Charters instruas la hispanan lingvon, kulturon kaj literaturon en Ilinojsa universitato. Li ankaŭ aktivas en Esperantujo, i.a. kiel membro de la Akademio de Esperanto.

Post la prelego la ĉeestantoj trinkos aperitivon kaj povos komune vespermanĝi en proksima restoracio.

# Promenu en Bruĝo laŭ enigmo



Por festi sian 80-jariĝon, la Bruĝa Esperanto-klubo invitas por partopreni en ĝia “Enigma Promenado” organizata de Bart Demeyere **sabaton la $1^{an}$ de julio 2017**, kaj tiel (re)malkovri la plej belajn lokojn de la mezepoka Bruĝo, gajni allogajn premiojn kaj lunĉi kontraŭ 5 € (biologia pano kaj supo).

Vi solvu la bruĝan enigmon retrovante la vojon, kiun iris 4 junaj denaskaj esperantistoj. La enigmo finiĝos per filmo, en kiu aktoras la 4 gejunuloj – neforgesebla sperto!

Rendevuo ĉe la Bruĝa stacidomo (kajo 1) je la 10:05. Ĉiujn informojn kaj la aliĝilon vi trovos en la retejo: www.esperanto.be/brugge










## KOLOFONO

La ***Norda Kuriero*** estas la informilo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio.

Redaktis: Katja Boen, Xavier Dewidehem.
Enpaĝigis: Xavier Dewidehem.

Ni invitas la federacianojn kaj la klubestrojn sendi informojn al la *Norda Kuriero* per la jena adreso: **kuriero@esperanto-nord.org**